

n-ro 81 bis

julio 2003

# La Merkato

ISSN 0941-9306

Lawrence MEE

## La Stelo

### Morto de ekonomia iniaciato

Prezo: 2,50 EUR/USD

---

#### Enkonduko

En 1998, laŭ peto de Ivo Durwael, tiama sekretario de Flandra Esperanto-Ligo, Lawrence Mee (1922-2002) ekverkis eseon pri la Stelo, monunuon kreitan de esperantistoj en 1942. Nederlandlingva traduko aperis en 'Jaarboek 2000 van het Europees Genootschap voor Munt- en Penningkunde' (Jarlibro 2000 de la Eŭropa Societo por Studo de Moneroj kaj Medaloj); ĝi legeblas je <http://users.skynet.be/egmp/artikels/esperanto.pdf>.

Memore al sia kunfondinto, Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo nun aperigas la originalan version de la eseo kaj disponigas ĝin al la esperantista komunumo. Ĉar Lawrence Mee ne de la komenco estis ligita al la projekto, la eseo ne enhavas ĉiujn informojn pri la Stelo; multe restas esplorenda. La Stelo ankaŭ ne estis la unua mona projekto en Esperantujo: ĝin antaŭis, ĝis la unua mondmilito, la Speso.

Hans Jankowski en sia broŝuro 'Esperanto-mono' jam koncize priskribis ĉiujn projektojn. Ni esperu ke iam iu sukcesos, surbaze de la disaj informoj, verki la kompletan historion.

Ĉi tiu broŝuro estas eldonita etkvante, por la IKEF-membroj kaj por kelkaj interesitoj. Ĝi ankaŭ legeblas je [www.ikef.org](http://www.ikef.org).

Roland ROTSAERT, kasisto de IKEF  
([www.ikef.org](http://www.ikef.org), [ikef@uea.org](mailto:ikef@uea.org))

---

## **La Stelo: morto de ekonomia iniaciato**

Ne eblas fari rakonton pri la Stelo se ni ne unue priskribas la historion de Universala Ligo, la asocio kiu kreis tiun monunuon.

### **Universala Ligo - la fruaj jaroj**

Tiu historio komenciĝis jam dum la plej mallumaj tagoj de la dua mondmilito, kiam en Nederlando, je la 25a datreveno de la morto de D-ro L.L. Zamenhof, la 14an de aprilo 1942, grupo de fidelaj esperantistoj sekrete kunvenis en privata domo en Hago por fari omaĝon al tiu pioniro.

Tiuj kunvenintoj, kun personaj spertoj jam pri la barbara tiraneco dum la okupado, volis kune fari ion konkretan por ŝirmi la homaron de nova mondkatastrofo. La frukto de la diskutado estis la unuanima decido fondi, sub la nomo 'Universala Ligo' (poste: 'UL'), tutmondan organizaĵon kun la celo labori speciale kaj rekte por la efektivigo de la originala programo de Zamenhof, unuigi la homaron per komuna lingvo. Per la fondo de UL oni intencis plenumi la spiritan testamenton de LLZ kaj samtempe plenumi ankaŭ la insistan deziron, kiun dum kaj la antaŭ- kaj dummilitaj jaroj multaj esperantistoj en diversaj landoj elkore esprimis.

Ankoraŭ en sekreto, tiuj decidfarintoj varbis aliajn konatajn esperantistojn aliĝi kun ili dum diskutoj, en la formo de 'Prepara Komitato' (ĉi poste: 'PK'), por progresigi la ideojn, kaj pripensi la organizajn principojn kaj aliajn detalojn de la liga agado. Je la 1a de julio 1945, tiu PK kunmetis kaj eldonis 'Alvoko'-n al la tutmonda esperantistaro por aliĝi kaj doni subtenon al la starigota UL. Inter la proponoj de tiu PK estis la transpreno por esti sia de la tiam morta gazeto 'La Praktiko', la adopto de la devizo 'Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali, por reunuigi la homaron' (frazo el la poemo : 'Preĝo sub la verda standardo' de Zamenhof), kaj labori por starigo de tutmonda monsisistemo, bazita sur internacia monunuo al kiu oni donis la nomon, la Stelo. Konkreta decido de la PK estis okazigo de la unua ĝenerala kunveno de la Ligo, je la 16a de marto 1946, ankaŭ en Hago (ĉe la domo de Internacia Esperanto-Instituto (IED), kiu dum la milito lokigis oficialan regadteamon kaj kiu tiam ĵus estis redonita far la registaro).

---

Jam antaŭ la tago de tiu unua Ĝenerala Kunveno la Ligo fieris pri 1294 membroj, en diversaj landoj. La Kunveno adoptis statuton por la Ligo, aprobis la transprenon de la gazeto 'La Praktiko', deklaris oficiale por UL la uzon de Esperanto kiel komuna lingvo por ĉiuj bezonoj, kaj starigis subkomitaton por ellabori regulojn pri la uzo de la Stelo. La kotizo por membreco de la Ligo estis fiksita por esti unu 'briko' por dumviva membreco; la valoro de 'briko' estis egala al unu Stelo. Baldaŭ poste, oni anoncis ke la valoro de la Stelo estu egala al la kosto de unu ordinara pano en Nederlando, kiu tiam estis kvarono de guldeno. Alia rezulto de tiu Ĝenerala Kunveno estis la uzo de la slogano, 'Unu mondo - unu lingvo - unu mono'.

### **La Stelo**

Ni lasu, provizore, nian rakonton pri la historio de UL, kaj donu plenan atenton al tiu kreitaĵo, la Stelo. Atentinda estas la fakto ke jam tiel frue tiu Ligo fieris pri bankrilatoj en ses landoj (Belgio, Danlando, Germanio, Italio, Svedio kaj Svislando), krom tri apartaj bankrilatoj en Nederlando mem. Por ĉiuj tiuj kontoj, UL faris kontotenadon rigore en kaj la koncernaj naciaj valutoj kaj en Steloj, kaj krome nomis 'agentojn' en dek kvar kromaj landoj, kiuj simile raportis financajn traktaĵojn surbaze de la Stelo.

### **Konstantvalora monunuo**

Estas evidente el arkivoj de UL ke la fona intenco estis bazi la novan socian ordon sur konstantvalora monunuo, ĉar nur tiel eblus montri al la cetera mondo la eviton de tiuj premoj ekonomikaj kiuj kaŭzas konfliktojn inter popoloj. Sekve de tia filozofio, UL adoptis kiel bazon por la Stelo tiun koston de ordinara pano en Nederlando, tiam egala al kvarono de guldeno. Por la kurzirilatoj de la Stelo en la aliaj landoj oni simple prenis ilin el la kuranta, iam en 1946, kurztabelo de la ĉefa komerca banko en Nederlando.

Kompreneble por tiuj fruaj tagoj, oni devis flankenlasi provizore aliajn paŝojn, cele al starigo de aparta banko liga, kun tutmonda ĝiro-pago sistemo, al eldono de efektivaj moneroj aŭ/kaj monbiletoj, ktp. La Ligo kredis, ke la reguloj pri financaj traktaĵoj inter diversaj ŝtatoj estis tiam kaj estos sufiĉe severaj por ŝirmi siajn financajn rilatojn kontraŭ iujn atencojn.

---

Eĉ en tiuj fruaj tagoj la Ligo emisiis t.n. 'premio-kupono'-jn en la valoro de unu Stelo, ĉiuj kun valideco ĝis la fino de 1950 (kun la celo, sendube, fari postajn emisiadojn kun 'vivo' de kvin jaroj). La Ligo invitis utiligon de la premio-kuponoj por pagi kotizojn kaj anoncojn, por pagi la kostojn de eldonaĵoj, ktp. La kuponoj estis donitaj al ligaj membroj por esti premioj por varbo de novaj membroj, aŭ post partopreno en la konkursoj de la Ligo. Uzado de la premio-kuponoj floris, kaj baldaŭ estis kutime (laŭ raportoj en La Praktiko) fari pagojn dum Universalaj Kongresoj k.s. per tiaj kuponoj.

Domaĝe, la bonaj intencoj de la fondintoj de la Ligo, doni al la Stelo konstantan valoron, ne ricevis la bezonatan nutradon flanke de la ekonomistoj de la mondo. La prezo de pano en nederlandaj guldenoj konstante, kvankam malrapide, plialtiĝis, sed neniu persono aŭ instanco prenis la necesan decidon ŝanĝi la rilaton inter la Stelo kaj la nederlanda guldeno. Tiu rilato restis je kvar Steloj por ĉiu guldeno, kaj oni ĉiam uzis la aktualaĵajn kurzilatojn de la bankoj por fiksi la valoron de la Stelo en aliaj landoj. Krome, la bona intenco teni la kontojn de UL surbaze de la Stelo ĉesis esti sekvita, eĉ en UL mem, kaj do neniu akiris la necesajn spertojn rilati kun konstantvalora monunujo. Ne mirige, la Stelo perdis la renomon kiun ĝi havis, kaj estiĝis simple kuriozaĵo de la esperantistoj.

### **Sonĝo realiĝis**

Membreco en la Ligo floris, tamen, atinginta ĝis 15 000 esperantistojn en la malfruaj kvindekaj jaroj. Kaj en 1959, unu sonĝo de la fondintoj realiĝis: la Ligo emisiis Stelo-monerojn je valoroj de unu, kvin kaj dek Steloj.

Tiuj moneroj estis faritaj el bronzo, latuno kaj kupro-nikelo respektive, far la ŝtata monerfarista instanco de Nederlando, sekve de mendo de la Ligo, kiu tiam estis riĉa sekve de tutmonda membraro. Vendoj de la moneroj rapide redonis al la Ligo la investon, kaj en 1965 eblis eldoni alian moneron, tiam el arĝento je valoro de dudek kvin Steloj. Vendado floregis kiel sekvo.

Sed la alia sonĝo de la fondintoj, ke la Stelo restu konstantvalora, restis kvazaŭ forgesita, krom inter nun tre aĝaj liganoj. Vera aktiveco de la Ligo

---

preskaŭ ĉesis, escepte por eldonado de la gazeto 'La Praktiko' (kiu nun ricevis la kromtitolon, 'La gazeto de la mondpopolo', anstataŭ la pli fruan titolon 'La gazeto, kiu instruas kaj amuzas'), kaj eĉ tiu gazeto ĉesis eldoniĝi en 1972, kiam s-ro Andreo Cseh, la redaktoro ekde 1946, demisiis el la tasko pro malforta sano.

### **Persona partoprenado**

La nuna aŭtoro komencis aktiviĝi en UL dum tiu ĵus prialudita periodo de malsano, kiam kun sia edzino li iris frue en 1973 por labori ĉe la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kiel oficisto.

En 1974, kelkaj fidelaj anoj de la Ligo prenis la ŝarĝon revivigi tiun faman asocion. La Ligo rekomencis aktivadon por paco, kun ligoj nun kun la Mondasocio de Mondfederalistoj kaj kun UEA.

En la daŭro de du jaroj, la plikuraĝigitaj funkciuloj diskutis la evoluon de la Stelo, aparte por re-enkondukiĝo de ĝi por esti internacia monunujo. Post pluaj diskutoj, oni revalorigis la Stelon, por ke ĝi egalas al duono de guldeno, anstataŭ kvarono, kaj la ligiteco al la prezo de pano malaperis. Post ankoraŭ pluaj diskutoj, al kiuj la nuna aŭtoro faris kontribuojn, la Ligo decidis stabiligi la valoron de la Stelo.

### **Konstantvaloreco**

La signifo de stabiligo de la valoro estas, ke ekde iu dato la aĉetpovo de la Stelo restu ĉiam la sama, neniel influita de inflacio. La koncerna dato estas januaro de 1977.

Komence de tiu jaro, unu Stelo estis egala al duono de guldeno. Alivorte: la aĉetpovo de unu Stelo estis egala al la aĉetpovo de duono de guldeno. Mi enkondukis la esprimon, la kurzo de la Stelo kontraŭ la guldeno, kaj mi vortumis ĝin tiel, ke unu guldeno egalas al du Steloj.

Mia kontribuo al tiuj diskutoj estis grande influita per artikolo, lastatempe tiam publikigita en la formo de broŝuro, kiun verkis Josef Hartl en Vieno.

---

La temo de tiu verko estis propono, fare de d-ro Hartl, enkonduki kaj utiligi konstantvaloran monunuon en la batalo kontraŭ la atencoj de inflacio. La bazo de la ideo estas, ke en ĉiu lando, senrigarde al la evoluetapo de la aparta lando, oni povas kalkuli la koston, en la nacia valuto de tiu aparta lando, de monata elspezo de tipa familio. Oni arbitre donas al tiu 'meza monata elspezo' la valoron de mil novaj unuoj. Laŭ difino, do, la 'sufero' kaŭzata al familio en kiu ajn lando per elspezo de, ekzemple, dek 'novaj unuoj' estas absolute egala, senrigarde al la nombro de nacivalutaj monunuoj bezonataj por egaligi tiujn dek 'internaciajn monunuojn'.

Oni, do, devas zorge kalkuli la rilaton inter la internacia monunuo (ni nomu ĝin imuo), kaj la nacia valuto, kaj foje ŝanĝi tiun, oficialan, rilaton kiam ŝanĝo estas diktita per inflacio en la aparta lando. Ĉiam poste, do, la imuo povas esti la bazo de interlandaj transakcioj, kaj ĉiam poste nacia mono restus ene en la aparta lando, preter la atencoj de spekulaciintoj, sekure senutila por arbitraĝo. La artikolo de d-ro Hartl funde esploris tiun kaj aliajn hipotezojn. Menciinda tie ĉi estas, ke la filozofio malantaŭ tiuj proponoj de d-ro Hartl estas la ideo, ke ŝanĝoj en la rilatoj inter naciaj valutoj kaj la imuo sekvu inflacion, kaj neniam kontribuu al ĝi.

Kiel ofte okazas, eventoj kuris samtempe, sen evidenta interdependeco. En la sama jaro, 1976, la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) faris premon je UL por revaluto (plivalorigo) de la Stelo. Novaj adeptoj prenis gvidajn rolojn kaj la Ligo retrovis forgesitan stokon de Stelo-moneroj, kaj samtempe komencis eldonadon de nova Bulteno. Nederlanda monreformisto publikigis artikolon pri la netaŭgeco de la ordinaraj monistemoj de la evoluintaj landoj, kaj d-ro Hartl publikigis sian broŝuron.

### **Nova Kasisto por Universala Ligo**

Frue en la sekvanta jaro, 1977, mi akceptis la taskaron esti kasisto de UL. Kun granda entuziasmo, mi zorge studis la bezonojn implicitajn en stabilvaloreco de internacia monunuo, prenante en konsideron la ĝis-tiaman historion de UL kaj la Stelo. La ceteraj estraranoj de la Ligo, ĉefe C.M.N.T. Op 't Roodt kaj W.P. Roelofs, kun similaj entuziasmoj, volis establi kiel eble plej frue la agmanierojn teni konstanta la valoron de la

---

Stelo, kaj publikigi tiun konstaton en la Esperanto-Movado. La ideo, ke la valoro de la Stelo restu konstanta, ne tuŝita de inflacio, komencis esti la ĉefa diskuttemo en la nove establita Bulteno de Universala Ligo, sub la redaktoreco de S-ro Op 't Roodt.

Okazis, ke UL tiutempe havis bankrilatojn en sep landoj, inkluzive de Nederlando, kiel jam menciita pli frue en tiu ĉi teksto, kaj sekve necesis preni decidojn pri la valoro de la Stelo en tiuj aliaj landoj. Ŝajnis logike esperi, ke stabilvalora Stelo havu la saman aĉetpovon en ĉiuj el tiuj landoj, kaj same konservi tiun aĉetpovon, ne influitan de inflacio en iu lando, nek tuŝita de la kapricoj de la intervalutaj kurzoj fiksitaj de la komercaj bankoj.

Pro manko de science bazitaj informoj pri la efektivaj aĉetpovoj (laŭ la difino de d-ro Hartl) de la naciaj monunuoj en la diversaj landoj, estis ne-eble fiksi tute fidindajn rilatojn por la Stelo kaj la naciaj valutoj. Nur la rilato kun la nederlanda guldeno estis preter diskuto. Sed la diskutoj pri la aliaj rilatoj ne estus facilaj.

Aparte, d-ro Roelofs volis doni al la Stelo iun karakteron tute fremdan al la karaktero de la imuo de d-ro Hartl, kaj samtempe li volis uzi la Stelon kiel bazon de sia monreformista propagando. D-ro Roelofs volis utiligi la Stelon por esti bazo de interŝanĝoj financaj inter diversaj landoj, sed neniel rilati kun komercaj bankoj, kiuj por li estas abomenindaĵoj. Detaloj de la sistemo neniam estis klare priskribitaj al la nuna aŭtoro, supozeble pro tio, ke por monreformistoj tiuj detaloj estas jam bone konataj.

La nuna aŭtoro volis por la Stelo rolon laŭ la originala celo de UL, kvankam agnoskante la relative arbitran bazon de la atribuitaj, komencaj aĉetpovoj. Eĉ post monatoj de diskutado, neniel eblis trovi kompromison inter tiuj du kontraŭaj sintenoj, sed tamen d-ro Roelofs akiris subtenon de plimulto en la tiama Estraro de la Ligo. Pro morala neeblo subteni tian decidon, tiel kontraŭan, miaopinie, al originalaj esperoj de la pioniroj de la Ligo, mi ekŝiĝis el ĉiuj funkcioj en la Ligo. Tiu Ligo eniris denove dormantan staton. De tempo al tempo d-ro Roelofs, en la Bulteno, anoncis novan ciferon kiel la 'oficialan' valoron de la Stelo, sed neniam estis publikigita la metodo, nek la kalkuloj, sur kiuj li bazis sian formulon. Bedaŭrinde, mi

---

ne povas malkovri nun iujn el tiuj anoncitaj ciferoj de d-ro Roelofs, kvankam sendube ili ja restas en ies arkivoj.

### **La ne-oficiala Stelo**

Por la nuna aŭtoro, la bazaj ideoj de d-ro Hartl ne mortis, tamen. Jam antaŭ la disiĝo kun UL, mi estis komencinta uzi la Stelon kiel bazon de la kontentado en la entrepreno kiun mi proprietulis kun mia edzino, nomita 'Mondkomerca Eldonejo Esperantista'. Post la disiĝo, mi provis sekvi la kurzkonsilojn de UL, laŭ la formulo de d-ro Roelofs, sed tre baldaŭ komencis suspekti, ke fidela utiligo de tiuj konsiloj kondukus al eraroj, el la vidpunkto de aĉetpovo de la Stelo. Ekde la mezo de 1980, mi komencis kolekti statistikajn donitaĵojn pri inflacio, ne nur por Nederlando sed ankaŭ por pluraj aliaj landoj. Hazarde, mi ricevis subtenon de ne antaŭvidita flanko: ekonomika docento ĉe la Erasmus Universitato en Roterdamo, okaze de interŝanĝo de ideoj dum paŭzo inter esploraj sesioj dumtagaj en la universitata biblioteko, esprimis grandan intereson en la kaŭzo de miaj studoj, volante ekscii pli pri mia progreso. Sekve de tiu intereso, mi ricevis kvazaŭ honoran membrecon de tiu biblioteko, kaj konsilojn pri fontoj de statistikaj donitaĵoj, ĉefe pri la dudek kvin landoj-membroj de la Organizaĵo por Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo (OEKE, angle *OECD*). La landoj en tiu organizaĵo baldaŭ estiĝis mia elektita kampo de esploroj, kaj la laboro komencis esti ĉefa okupo por miaj liberaj horoj.

Mi baldaŭ sukcesis fari komparojn por ekkonстати la aĉetpovon de la (ne plu oficiala) Stelo en tiuj landoj, uzante kiel elirpunkton la arbitrajn rilatojn por la unua tago de 1977, la tago je kiu, laŭdifine, la Stelo akiris konstantecon de valoro. La unua malkovro estis, ke la formulo de UL certe kondukus al eraroj rilate al Nederlando. Mi suspektis, sen ebleco pruvi tion, ke ĝi ankaŭ kondukus al eraroj rilate al aliaj landoj.

La evoluo de aferoj plirapidigis por mi kiam, ekde la mezo de 1981, mi komencis publikigi, al elektitaj kunlaborantoj, kurzrilatojn en la formo de kurzlisto por la naŭ landoj respektive al kiuj mi povis pli malpli fidi pri miaj kalkuloj, pro tiu povo akiri la donitaĵojn frue kaj regule. (Baldaŭ montriĝis,

---

tamen, ke la donitaĵoj por Italio ĉesis veni regule, kaj mi devis rezigni pri kurzo por tiu lando.)

La baza sistemo de kalkulado akiris tiel konkretan formon, ke ĝi ebligus kunmeton de Stelo-kurzrilato por multe pli da landoj, se nur mi povus akiri la necesajn informojn sufiĉe akurate. Necesas konstati, tamen, ke la rezultoj ĝis tiu ĉi punkto povus havi limigitan, kvankam gravan, utilecon. La kalkulitaj kurzrilatoj povus taksii la aĉetpovon en nacia mono ekvivalenta al unu Stelo, kiam tiu sumo estas elspezita ene de la koncerna lando. Pli da laboro necesus, kun reto de kunlaborantoj en diversaj landoj, antaŭ ol la Stelo povus servi nin por aliaj celoj.

Aferoj eĉ pli akceliĝis post aĉeto de (laŭ hodiaŭaj normoj tre primitiva!) komputilo. Eblis jam en septembro 1982 verki programon por tre rapide fari la kalkuladojn por prognozi la Stelo-kurzrilatojn por diversaj landoj. Ekde tiam, mi eldonis gazeton kun la titolo 'Informkajero pri la Stelo', kiu baldaŭ cirkulis al tiuj pluraj entuziasmaj kunlaborantoj, aparte pro la valora helpo de la Esperanto-Centro en Aarhus, Danlando.

### **La kalkulpaŝoj por fiksi kurzrilatojn**

Jam je la komenco de pripensado pri la kalkulmetodo necesas agnoski, ke la baza aĉetpovo de la Stelo en, ekzemple, Britio estas arbitre adoptita pro la fakto ke, je la 1a de januaro 1977, unu brita pundo egalas al 4,1875 nederlandaj guldenoj, laŭ la intervalutaj kurzoj de la grandaj bankoj. Ĉar unu guldeno egalas tiam al 2000 Steloj, sekvas, ke unu pundo egalas al 8375 Steloj, kaj tiu rilato restos valida ĝis, se iam, ni havos pli fidindan metodon kompari la aĉetpovon de la Stelo en la du landoj. La saman sistemon mi aplikis al aliaj landoj por kiuj mi kolektis statistikajn donitaĵojn.

Tiuj rilatoj daŭre ŝanĝiĝas pro inflacio, tiu monda malsano kiu konstante malaltigas la aĉetpovojn de la naciaj valutoj. Por kalkuli novajn rilatojn mi uzis la oficialajn prezindicojn por konsumajoj. Prenante denove la kazon de Britio, ni konstatas, ke la prezindico por januaro 1977 estis 172,4 surbaze de cifero de 100,0 en la jaro 1974. Multobligo de la baza rilato de 8375 per 172,4 donas grandon de 1443,85 nedifineblaj unuoj. Divido de tiu granda

---

per la aktuala prezindico por iu aparta monato donas novan, teorian kurzrilaton por la Stelo, en tiu kazo por Britio. Por entute dek ok landoj mi konstatis tiam tiel rilatatan grandon, kalkulitan en la sama maniero.

### **La adoptitaj bazaj reguloj**

Jam estis mencio pri la arbitra decido konstati bazajn aĉetpovojn de la Stelo en aliaj landoj ol Nederlando. Dum la polurado de mia kalkulbazo mi adoptis aliajn arbitrajn decidojn, ĉiujn prenitajn kun la celo prezenti akcepteblajn kurzrilatojn. Tiu aro de decidoj estiĝis la regularo sub kiu mi laboradis tiam, kaj laboradas ankoraŭ nun, por la regulaj rekalkuloj kaj publikigo de la kurzrilatoj.

Mi decidis deklari rilatojn nur sesfoje en kalendara jaro, kaj deklari ŝanĝitan rilaton nur se por tiu lando nova kalkulo donas teorian rilaton, kiu diferencas je pli ol 1,05 elcento de la laste deklarita rilato por tiu lando. Krome, mi ĉiam rondigas la teorian rilaton supren, por doni la plej apudan ciferon inter 1,005 kaj 9,995 inkluzive, ĉiam kun tri decimalaj ciferoj post la decimala komo, kaj ĉiam dividebla per kvin sen restaĵo. Por pluraj landoj, tiu decido signifas, ke mi devas uzi grandon de dek, cent aŭ mil unuoj de la nacia valuto por atingi akcepteblan rilaton. Krome, por ĉiu deklarita rilato estu donita dato de valideco, estante la unua tago de la monato post publikigo de la koncerna prezindico.

Ĉiuj el tiuj arbitraj decidoj estos ŝanĝeblaj, se iam eblos starigi internacian organizaĵon, kiu kapablos surprizi respondecon por la afero. Tiu alprenita 'regularo' donas uzeblajn 'kurzojn' ne tro ofte ŝanĝitajn sed tamen pli-malpli fidele montrantaj la efektivan daŭran falon en la aĉetpovo de la koncerna nacia valuto. Aldonendas tie ĉi mian promeson liveri al iu serioza petanto plenajn detalojn pri la kalkulmetodo uzebla sur moderna komputilo.

### **La uzeblecoj de la Stelo**

Ĉar la Stelo estas monunuo de la esperantistoj, la unua ekzemplo de uzebleco estas tio de eldonisto de monata revuo, por kiu tiu eldonisto ricevas abonkotizojn de abonantoj. La eldonisto devas pagi kaj la servojn

---

de presisto, kaj la kostojn de papero, kovertoj kaj afranko, ktp. Sub la influo de inflacio, ĉiuj kostoj inklinas al plialtiĝo, sed ne ĉiuj samtempe kaj ne ĉiuj rekte rilataj al la aktuala nivelo de inflacio. Sed ne-eviteble venas la momento kiam tiu eldonisto devas pensi pri ŝanĝo, plialtiĝo, de la abonkotizo. Kutime, oni pensas dum septembro-oktobro pri taŭga abonkotizo por la tuto de la proksima jaro. Ni povas montri, ke rilatigo de tiu abonkotizo al stabilvalora monunuo konsiderinde plifaciligas la taskon, kvankam diversaj komercaj konsideroj nepre meritas apartan taksadon.

Ni pensu, do, ke nia imagita eldonisto estis kontenta dum 1977 pri abonkotizo de la ekvivalento de sesdek Steloj por unu jaro. Konstateblas, el niaj studoj pri la Stelo, ke daŭra ricevo de tia sumo (la ekvivalento de sesdek Steloj), plene kontentigas la bezonojn ankaŭ por iu nova jaro. Tiu eldonisto, sekve, bezonas la Stelo-kurzrilaton por, ekzemple, septembro, por havi ideon pri taŭga nivelo de la prezo por la proksima jaro.

### **Uzado de la Stelo ligita kun luprenpagoj**

Dua ekzemplo prenita rekte el spertoj de esperantistoj estas ludono de ĉambro al alia societo, ludonado por kiu la Esperanto-societo ricevas lupagon. Se la societo deziras daŭre ricevi la saman aĉetpovon (prudenta sinteno, ĉar aliaj kostoj por la societo inklinas konstante al plialtiĝo pro inflacio), la metodo estus fari interkonsenton kun la luprenanta societo por monata luprezco esprimata en Steloj kvankam normale pagota en nacia valuto laŭ la valida kurzo por la koncerna monato.

### **Uzado ligita kun salajroj**

Tria ekzemplo, verŝajne la plej valora el ĉiuj ekzemploj, estas tio de la ricevo de 'salajro' kontraŭ laboro farita. Ĉu aŭ ne ni tenas opiniojn pri la taŭgeco de tia sistemo, ni devas rekonigi, ke la fenomeno estas ordinara parto de la ĉiutaga vivo por la granda plimulto de la homoj en la mondo. Labordungito aŭ oficodejoranto regule ricevas sumon de mono, kiun ni nomu salajron.

Ĉiuj industriigitaj landoj spertas ankaŭ la alian fenomenon de inflacio.

---

Sekve, salajroj ne restas je konstanta sumo en la mono de la koncerna lando, ĉar inflacio daŭre malaltigus la vivnivelon de la koncerna familio, kaj plialtiĝo de la salajro estas la ununura metodo por mildigi tiun suferon. Sed en multaj kazoj, en tiuj industriigitaj landoj, diskutoj pri taŭga nivelo de plialtigo foje kondukas al vere akra disputo inter reprezentantoj de la du partioj, la labordonantoj kaj la laborfarantoj, aŭ iliaj sindikatoj. Homaj rajtoj en la koncerna entrepreno aŭ industrio estas foje endanĝerigitaj. Foje, re-akiro de kvieta etoso postulas konsiderinde longan periodon.

### **Personaj spertoj, denove**

Interesa konstato por mi, dum tiu periodo regule kolektanta statistikajn donitaĵojn pri prezindicoj, estis rimarki, ke la ciferoj por minimumaj salajroj en Francio ŝajne fidele sekvis la kurzrilaton kun la Stelo dum kelkaj jaroj, kvazaŭ iu oficisto uzis iun teorion monunuon laŭ nia modelo. Minimumaj salajroj en Nederlando ankaŭ pensigis min pri apliko de simila metodo, kvankam la rezulto ne estis tiel rimarkinda.

Kiam, jarojn poste, la registaro en Britio vokis proponojn por enkonduko de minimumaj salajroj, mi verkis longan raporton kaj serioze proponis similan solvon. La koncerna instanco dankis min pro miaj streboj, sed Ve! adoptis tute ne-taŭgan sistemon. Ni vidu, ĉu tiu sistemo ĝuos longan vivon!

### **Hipotezoj pri utiligado de la Stelo en la kampo de kapitalo**

Inflacio tuŝas nin ĉiujn, ĉu aŭ ne ni havas ĉiutagan konstaton pri ĝi, kaj tuŝas ĉiujn flankojn de komerco kaj industrio. Kiam la poŝta tarifo plialtiĝas, ekzemple, ni ja sentas premon je aĉeto de poŝtmarkoj laŭ la nova tarifo, sed ni ne havas alian elekton ol pagi la pli altan sumon se ni ankoraŭ deziras, ke nia eksterlanda plumamiko restu en kontakto kun ni. Por internaciaj societoj, plialtiĝo de la poŝta tarifo k.s. povas kaŭzi problemojn, pli aŭ malpli gravajn en apartaj cirkonstancoj, kvankam ĉiam malagrablajn.

Por entreprenoj, tamen, problemoj ligitaj kun inflacio reduktiĝas al fikso de taŭga nivelo de pli-altiĝo por vendoprezoj, kaj de taŭga dato por enkonduki la ŝanĝojn. Normale, aparta entrepreno ne dediĉas tempon al diskuto pri ĉu

---

aŭ ne plialtigi vendoprezojn, sed nur al diskuto pri la nivelo de la novaj prezoj. Rivaluloj certe spertas premojn similajn, kaj baldaŭ la situacio renormaliĝos je pli-malpli la sama ritmo kiel antaŭe, sub ĝenerale pli altaj vendoprezoj.

Tiuj diskutoj pri la nivelo de plialtigo de prezoj povas esti tre malfacilaj en apartaj branĉoj de industrio. En iuj kazoj, kiam produktado restas sur relative longa sinsekvo de apartaj laborpaŝoj, ĉar aĉeto de bazaj materialoj okazas longe antaŭ liverado al aĉetanto de la fina produkto en kiu tiu baza materialo estas uzita, la influo de inflacio estas ofte tre komplika fenomeno. La prezo por aĉeti novan provizon de la baza materialo povas esti signife pli alta ol la prezo uzita dum kalkuloj por fiksi vendoprezojn pli frue. Tuj leviĝas malfacilaĵoj decidi kiun prezon uzi: ĉu la hodiaŭaj merkatoj, ĉu prognozotaj estontaj prezoj, pensante pri la antaŭvidita nivelo de inflacio, aparte por ĉiuj materialoj?

Apliko de la Stelo al stokvaloroj povas konsiderinde mildigi la problemon en multaj tiaj kazoj, sed priskribo de la koncernaj paŝoj prenas tro da spaco por tiu ĉi eseo.

### **Universala Ligo - la fina periodo**

Estus facila afero tekstumi plurajn aliajn hipotezojn pri utiligeblecoj de la Stelo. Plejparte tiuj antaŭ-supozus veran internaciecon de la uzado, sed tia internacieco neniam realiĝis. UL daŭris post la eventoj jam priskribitaj, sed kun malpli da atento en la Esperanto-mondo. Pri aktiveco en la kampo de mondfederalismo mi ne havas informojn, sed tiu manko de informo subtenas mian opinion, ke ankaŭ tie la Ligo vere malmulte agadis.

Revuo Esperanto, en tiuj postaj jaroj, daŭre nekrologis pri konataj-al-mi liganoj el la jaroj de aktiveco. D-ro Roelofs transprenis la redaktorecon de la Bulteno de UL, kiam siatempe s-ro Op 't Roodt sentis sin ne plu kapabla plenumi la bezonojn de la taskaro, sed la perdo de reguleco de apero de tiu Bulteno klare montris al la Esperanto-mondo la veran mankon de aktivaj membroj. Dum 1993, sekve de decido de la Estraro de la Ligo, eldonado de la Bulteno ĉesis, kaj dum tiu jaro la kapitalo de la Ligo estis likvidita per

---

transdonado de mono al diversaj fondaĵoj, ĉefe ĉe UEA.

Inter tiuj donacoj estis la restanta stoko de la Stelo-moneroj. Baldaŭ UEA proponis vendadon de tiuj moneroj, kiel ordinaraĵo, tra sia libroservo.

S-ro Op 't Roodt mortis en 1996, kaj D-ro Roelofs en 1998, kiel la lastaj el la multaj kunlaborantoj por paco kaj monda kunvivado per la iniciatoj de UL. La Ligo ĉesis ekzisti; la mondo perdis per tio unu el la plej gravaj iniciatoj iam ajn elpensitaj inter esperantistoj.

La nuna aŭtoro agnoskas senton de honorigo, ricevinte la peton priskribi eventojn kaj konstatojn en tiu grava kampo.

Lawrence MEE

#### Aldonaj informoj pri la menciitaj personoj

**Lawrence MEE**, naskiĝinta je 24 februaro 1922, dumviva membro de Internacia Komercia kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF), je 27 oktobro 2002 forpasis post mallonga malsano. Li estis kunfondinto de IKEF (oficiale je 6 aŭgusto 1985 en Aŭgsburgo, dum la 70a UK). Tiam loĝanta en Rotterdam pro sia antaŭa laboro en la Centra Oficejo de UEA, ekde la fondiĝo de IKEF li rolis Ĝenerala Sekretario kaj krome redaktoro de la 'Laŭokaza Novajletero' (nia interkomunikilo antaŭ 'La Merkato') ĝis numero 26 de aprilo 1989. (...) Laurence Mee estis ĉiam persistema 'negocanto' por siaj ideoj. (IKEF-revuo La Merkato, januaro 2003)

**Christiaan M.N.T. OP 'T ROODT** (1905-1996), UEA-membro pli ol kvindek jarojn, emerita statistikisto, delegito ekde 1952 pri laktoproduktado, poste pri mondfederismo, mortis la 17an de novembro en Rijswijk (Nederlando). Li estis aktiva en Universala Ligo. (Revuo Esperanto, aprilo 1997)

**Willem P. ROELOFS** (1910-1998), pli konate kiel Petro Rulofido, forpasis la 11an de marto en Soest (Nederlando). Li lernis Esperanton en 1927 kun sia patro. Estinte membro de UEA ekde 1929, ankaŭ kiel fakdelegito pri kemio, li ekŝiĝis en 1962 (la epoko de la debato pri '-ata/-ita') pro lingva malkonsento. Tio ne malhelpis lin subteni la Asocion grandanime kiel patrono de TEJO, ano de Societo Zamenhof kaj mecenato de diversaj iniciatoj. Studinte kemion, Rulofido doktoriĝis en 1951 per disertaĵo pri ekonomika temo, kaj ankaŭ en la Harlema UK (1954) li prelegis pri mono, 'fundamenta homa kreaĵo'. Ekde la lanĉo de 'Scienca Revuo' en 1948 li estis ties kunredaktoro ĝis 1961. Dum pluraj jardekoj li studis la refleksivon en Esperanto, kunmetante ekzemplaron de du mil citaĵoj. De 1977 li agis kiel kasisto kaj redaktoro de Universala Ligo, malfondita en 1996. Por Rulofido - frua rifuzanto

---

de militservo kaj aktiva pacisto - Esperanto, pacismo kaj novaj ekonomiaj konceptoj estis eroj de la sama homaranisma mondrigardo. (Revuo Esperanto, majo 1998)

Je [www.sdnl.nl/roelofs4.htm](http://www.sdnl.nl/roelofs4.htm) (Stichting Sociale Databank Nederland) estas 'In Memoriam' por **Peter ROELOFS** (+11 marto 1998, 87jara) en nederlanda lingvo.

'**Josef Hartl**' multfoje troveblas per interreta serĉado, sed ne eblis certigi ĉu temas pri la ekonomikisto menciita en la eseo.

#### Diversaj tekstoj pri Esperanto kaj mono

'**Esperanto-mono**' de **Hans Jankowski, 2a eldono, Kaunas, Litovio, 2000**: Ĝis nun la plej kompleta superrigardo: pri spesmilo, stelo, ĝirsistemoj, valormarkoj...

**Vivo de Andreo Cseh de Ed Borsboom, eld. Internacia Esperanto-Instituto, 2003**: La 15a ĉapitro de la libro rilatas al la Stelo.

**Streboj al internacia mono**: Artikolo en 'Franca Esperantisto' (januaro 1994) transprenita de 'Eventoj' (marto 1994), pri la periodo ĝis la unua mondmilito.

Mencioj pri spesmilo kaj stelo en intervjuo kun L.C. Zaleski-Zamenhof en '**le monde de l'Espéranto**', novembro-decembro 2002, p. 8.

**Unueca eŭropa valuto**: Artikolo pri Josef Zauner, kiu inter 1921 kaj 1933 engaĝiĝis por unueca eŭropa valuto. (Revuo Esperanto, marto 2002; vidu ankaŭ ilustraĵon ĉe [www.promeuro.org/en/products-annexes.asp](http://www.promeuro.org/en/products-annexes.asp))

**Internacia Scienca Societo**: 'Eble ne estas ĝenerale sciata, ke dum kelkaj jaroj la Internacia Scienca Societo uzadis teorian monan unuon nomitan speso, tiel malgrandan ke 1000 (spesmilo) estas ekvivalenta al 2003 anglaj ŝilingoj.' (Citaĵo el 'Yorkshire Post' en 'Joseph Rhodes kaj la fruaj tagoj de Esperanto en Anglujo', p. 109, Jorkŝira Esperantista Federacio, 1904?)

**Wikipedia**: Diversaj mencioj, i.a. je <http://eo.wikipedia.org/wiki/Spesmilo>.

En '**Studoj pri Interlingvistiko**' (Kava Pech, 2001) Hans-Burkhard Dietterle mencias (p. 472-473) preparojn por Esperanto-konferencojn pri Komercio kaj Trafiko (1923) kaj pri Komercio kaj Ekonomio (1925). Ne estas klare ĉu tiuj konferencoj okazis.

Kontaktadreso: Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge